# Komuniko de UEA kaj ILEI

EKO 2020-03 sendita el Auckland, Nov-Zelando la 16an de januaro

## Duncan Charters en la AMO-seminario en Burundo

Dum la 7-a Afrika Kongreso estis aranĝita kiel parto de la 61-a AMO-seminario pri eksteraj rilatoj unuhora skajpa interveno de la prezidanto de UEA, D-ro Duncan Charters. Dum iom pli ol 20 minutoj li skizis du temojn por posta interago: kiel prepari sin por informi pri Esperanto, kaj kiel sinteni por eviti konfliktojn. Per personaj spertoj li montris ke ofte sukcesas eĉ en malfacilaj situacioj trankvila kaj amikema sinteno kaj baza respekto ĉu al amiko, ĉu al ĵurnalisto aŭ intervjuanto, kun deziro helpi en tiuj kazoj informi la legantojn aŭ aŭskultantojn pri interesa materialo. Ofte efikas unue konsenti pri la valideco de aserto aŭ demando, montrante ĝin inteligenta laŭ ĝeneralaj supozoj kaj antaŭaj kredoj de la intervjuito mem, tamen aldonante sperton kiu konstatas ankaŭ alian flankon kaj pro tio malfermas novan perspektivon. Oni povas ekzemple konsenti ke ne ĉiuj parolas Esperanton sen influo de nacilingvaj kutimoj. Tamen sperto montras ke oni kutime povas pli klare kompreni parolanton de Esperanto, ĉar lernantoj de la internacia lingvo konscias pri la ekvilibro inter vokaloj kaj konsonantoj, kaj la neceso de klareco por ambaŭ kiam oni parolas kun alilingvanoj. La hispana lingvo estas malpli facile komprenebla ĉar regas la vokaloj, kiuj ofte aŭdiĝas malforte. Kontraste, la angla lingvo pli dependas de la konsonantoj, kaj malsamaj vokaloj en neakcentitaj silaboj ne estas klare distingeblaj. Tiu ekzemplo konvinkas kiam ĝin klarigas kun aŭtoritato anglalingva instruisto de la hispana (aŭ hispanlingva instruisto de la angla). Por esti efika informanto, uzu proprajn sciojn kaj spertojn, kaj ĉiam prenu sufiĉan tempon por kontroli la faktan bazon de ĉiuj asertoj kiujn vi intencas fari. Ne ĉiuj eĉ presitaj propagandaĵoj konformiĝas al tiu regulo.

Rilate konfliktsolvadon, oni konsciu, same kiel en intervjuo, ke insista aserto pri sia praveco aŭ la stulteco de la opinio de la kunparolanto plejofte nenion utilan atingas! En asocioj kiuj batalas por antaŭenigi ideon gravan por la mondo sed ne popularan, nature naskiĝas kolizioj inter kunbatalantoj kiuj malsamopinias pri la plej efika maniero trarompi la muron de skeptika publika opinio. Tamen necesas respekti la bonan motivadon de samideano kiu povas esti tre malsama laŭ personeco kaj



aliaj kredoj, sed sincere laboras por la samaj idealoj rilate mondan komunikadon. Humileco kaj subteno de ideoj kiuj povus esti efikaj loke aŭ internacie eĉ se ili ne kongruas kun la niaj naskas kunlaboremon kaj novajn alirojn. Se iu emas kritiki aliajn, utilas komenci per si mem kaj pensi pri kiel plibonigi la propran sintenon, ĉar pozitiva, pli amema intertrakto kun aliaj liberigas ilin por pli bone interagi kun ni.

Leviĝis interesaj demandoj post kiam la prezentinto atentigis ke ofte ne temas pri tio ĉu iu ideo aŭ ago estas prava aŭ malprava, sed pri la interpersona kaj interkultura kunteksto. Ĉiuj devas juĝi sian propran situacion, kaj bona komunikado okazas kiam oni pli konscias pri si mem kaj pri sia propra kulturo. Unu el la seminarianoj indikis ke ekzistas afrika proverbo kiu instruas ke kiam oni ekbruligas fajron, necesas ekbruligi alian por ke la du fajroj bruladu kaj reciproke sin estingu. Ĉu ankaŭ tio validas? La prezentinto substrekis ke tio estas bonega ekzemplo de la neceso uzi sian juĝkriterion por specifa cirkonstanco. Povas esti ke du individuoj devas emocie senŝarĝiĝi pri disputata afero, kaj post la eksplodo, povas reveni al normala komunikado. Se en la kulturo forta disputado estas normala, kaj kondukas al pliklarigo de la ideoj kaj sintenoj sen personaj ofendiĝoj, la imagbildo havas sencon. Tamen danĝero povus esti ke la du fajroj forbruligus ĉion alian kaj pro tio malhelpus rekonstruadon de normalaj rilatoj en la grupo.



# Amerika Komisiono nun fondita

Jen la lasta el la kontinentaj komisionoj de UEA. Nun ni havas komisionojn por Afriko, Ameriko (vidu sube), Azio, Eŭropo kaj MONA (Meza Oriento kaj Norda Afriko). La Azia komisiono prizorgas Oceanion. Vi trovas informojn pri la komisionoj en <aktivulo.net> sub la rubriko ‘Landa agado’. Plie vi trovas tie detalajn raportojn pri unuopaj landoj – praktike ampleksigo de la siatempa landa sekcio en la Jarlibro. Videblas ankau listoj de la kontinentaj kongresoj.

Jen do la teamo, kiu prizorgas la Amerikan Kontinenton:

- Maritza Gutierrez, Kubo, gvidanto
- Fernando Maia, Brazilo, rilatoj kun UEA
- Guy Matte, Kanado. juraj konsiloj kaj rilatoj kun nordamerikaj esperantistoj
- Luis Obando, Kolombio/Nederlando, rilatoj kun sudamerikanoj
- Querino Neto, Bazilo, rilatoj kun TEJO tra la kontinento
- Rafael Mendoza, Ekvadoro, rilatoj kun ekvadoraj kaj peruaj esperantitsoj
- Ricardo Coutinho Rodriguez, Venezuelo/Argentino
- Stefan MacGill, kunordigo kun aliaj kontinentaj komisionoj.

La kromkomentoj celas nur indiki kampojn de kompetento, ne temas pri rigora disdivido. La komisiono funkcios teame por atingi siajn celojn.

Estas en konstruo pli vasta asembleo por Ameriko, por enpreni membrojn kiel eble plej komplete.

## La Estraro de UEA regule kunvenas – nube sed sendube

La Estraro de UEA jam de 2013 skajpe kunsidas dusemajne. La nova estraro daŭrigas tion. En la 11a de januaro okazis la lasta kunsido. Jen ses el la multaj traktitaj temoj.

- La Amerika Komisiono prezentita supre estas akceptita
- Nova Ĉefdelegito por Brazilo akceptita (Rodrigo Tavares)
- Aktivaj esploroj pri la UK en 2022  (elekto-jaro), i.a. en la centra Eŭropo
- Instigoj por UK-invito iam el Oceanio aŭ la apuda Azio..
- Subteno de informado en *Polandrock* en 2020.
- Auspiciio por la 8a Eŭropa Kantfestivalo en Vroclavo.

La Estraro bonvenigas proponojn aŭ ideojn por estontaj estrarkunsidoj.

## Renovigo en la antipodoj

Okazis en Auckland la jarkunveno de NZEA, kiu elektis novan estraron, i.a. pro la demision de la ghisnuna prezidanto, kiu tamen restas en la estraro.  Jen la nova konsisto:

Prezidanto: Ivan Pivac.
Vic-prezidanto: Chris Krageloh,
Kasisto kaj sekretario: David Ryan.
Help-sekretario: Dave Dewar
EstraranojL: Erin McGifford, Bradley McDonald.

La observanto de NZEA por UEA: David Ryan, kiu partoprenos en Montrealo.

NZEA certe bonvenigos bondezirojn el la internacia publiko!

Vortoj: 775

Por la finaj anoncoj, vidu komunikon el 2019.